

REVUE

FONDITA en 1908 - TRIA SERIO

34a Jaro - N° 240 Okt-Nov. 1966

FRANÇAISE

D'ESPERANTO

FRANCA ESPERANTISTO

34, Rue de Chabrol. Paris X° — Métro : Gare de l'Est ou Poissonnière — Tél. : PRO. 55-03.



En nia lasta numero de "Franca Esperantisto" mi alvokis la Esperantistojn, por ke ili zorgu pri malfermoj de kursoj: mi esperas, ke en ĉiuj urboj, kie loĝas bonaj esperantistoj, ni havos multajn kursgvidantojn.

VORTOJ

Ne gravas la nombro de la lernantoj, pli interesa estas la kvalito! Mi preferas kvin lernantojn kiuj bone studas la lingvon kaj restos en niaj vi-
coj, ol cent kiuj fantazie ĉeestas kursojn, kaj poste, malaperas en la naturon....

DE LA

Grava fakto estis la ekspozicio "Connaissance de l'Espéranto", kiu okazis en Parizo ĉe "Institut Pédagogique National". Korajn dankojn al la organiza-
nizintoj.

PREZIDANTO

La karavano de U. F. E. per aŭtobuso al la Uni-
versala Kongreso en Budapeŝto bone sukcesis. Ĝi estis trafa sperto por organizi la krozadon al TEL AVIV. Niaj legantoj trovos en tiu ĉi numero ĉiujn informojn pri tiu agrabla vojaĝo al la 52a U.K.

Vi ne estas masonistoj sed...tamen, vi povas aĉeti brikojn por la konstruado de nia Esperanto-
Domo en Parizo; la briko valoras 100 frankojn. Post la pago de viaj impoŝtoj - se restos iom da mono - ne forgesu nian domon. Dankon!

Ne forgesu ankaŭ legi "Konsilojn al la Grupoj", kaj aĉeti diskojn de haltado por via aŭtomobilo.

Por esti en bona sano oni devas ĉiam agi: kaptu la okazon vivi longtempe, agante por ESPERANTO.

René LLECH - WALTER
=====

RECENZOJ

"MODERNA ESPERANTO" The Internatio-
===== nal scientific
language, by Teodoro Lahago. English
version, 56 paĝoj, Lorth Las Vegas,
Nevada, Etats-Unis.

Oni ne scias, kial kelkaj perso-
noj deziras paroli aŭ skribi pri
aferoj aŭ subjektoj, kiujn ili ne
bone komprenas. Oni nur povas konsi-
li al ili, aŭ silenton aŭ obeon al
faktoj. Bedaŭrinde, tiu konsilo ne
povas atingi ilin, ĉar ankaŭ tion
ili ne povas kompreni. Do, mi direk-
tos miajn parolojn nur al eventualaj
legantoj de "Moderna Esperanto".

Se ili deziras nombri la erarojn
en la angla lingvo troveblajn en tiu
ĉi libraĉo, ili ne devas esperi dor-
mi dum pluraj tagnoktoj, antaŭ ol
konkludi tiun tedegan taskon. Sed
ili konvinkiĝos (obeante al faktoj),
ke la aŭtoro estas lingvistike kaj
stile blinda koncerne la anglaj lin-
gvo kaj stilo.

Tute logike kaj prave, ili ankaŭ
konkludos, ke la aŭtoro sentime kaj
fuŝe kopias Zamenhofan Esperanton aŭ
egale fuŝe proponas "korektojn", de
kiuj la plej klara rezultato estas
konfuz-nebul-ŝlim-igado de la mirin-
de klara, logika kaj nepre VIVANTA
Zamenhofa Lingvo. Sufiĉas. Oni ne
bezonas pli detale skribi pri tia
nekredebla modernigo de Esperanto.

Nevada estas mondfama kiel loko
de la eksperimentoj pri disatomigado
de la materio. Nun, tiu ŝtato estos
fama kiel loko de la eksperimentoj
pri disatomigado de Esperanto. Feliĉe
ĝis nun, la homaro ĝenerale kaj Es-
peranto speciale, daŭrigas s i a j n
respektivajn vivojn.

La "Moderna Esperanto" mortnaski-
ĝis, vivu klasika Zamenhofa Esperan-
to, kies ĉefa forto estas mem-evolu-

ado laŭ la plej naturaj leĝoj de la
VIVO. Kaj for' la gemalgramatikuloj.

Robert MARTIN
=====

ETERNECO (Navarra Legendo) A. Nuñez-
===== Dubùs. Eldono de la Hispana
Esperanto-Federacio-Zaragoza. Prezo:
1 P. 13 paĝoj.

Tiu ĉi verko de hispana esperan-
tistino, publikigita okaze de la 27-a
Hispana Kongreso de Esperanto en
Bilbao ne estas sen kvalitoj.

Ĝi modeste montras, ke maljunaj
legendoj naciaj povas esti renaskigi-
taj kaj disvastigitaj tra la tuta
mondo dank' al Esperanto. Tio estas
konsilinda uzado -inter multaj aliaj
- de nia komuna lingvo.

La temo de la relativeco de la
tempo, flugante pli malpli rapide
estas bone konata ne nur psikologie,
sed ankaŭ fizike kaj metafizike. Le-
gante la Navarran legendon, oni na-
ture elvokas la amerikan rakonton de
Washington IRVING, t. e. "Rip Van
Winckle", kiu kredis, ke li trapasis
nur unu nokton en la montaro, sed
fakte dormis dudek jarojn. Oni ankaŭ
elvokas la legendon laŭ kiu EPIMENID
greka filozofa, dormis pli ol kvin-
dek jaroj en iu kaverno.

La rakonto estas facile legata
malgraŭ kelkaj preseraroj, kaj ne
tute taŭga versfarado. Tamen, oni
plezure konstatas, ke la ritmo estas
bona kaj regula, ekzemple en la sek-
vanta seslinia strofo (p.12):

Aŭdinte tion, la monaĥ' maljuna
Pro jaroj kaj pro fastoj kurbigita
Alproksimiĝas al abato nuna
Kaj, rajto por paroli permesita,
Komencas li per voĉo tre humila:

Mi aŭdis iom pri abat' Virila...

- 1) o-o -o oo- o-o
- 2) o-o oo- oo o-o
- 3) o-o -o oo- o-o
- 4) o-o oo- oo o-o
- 5) o-o oo- oo o-o
- 6) o-o -o oo- o-o

Robert MARTIN
=====

"INTERNACIA MONDREGNO KREIGANTA", de
=====
MARTINUS, tradukita de P.ZACHO, 95 p.
bindita - prezo: 5 F.

Ĉi tiu nova eldonaĵo de la "Martinus Instituto" estas fragmento de la ĉefverko de la dana pensulo Martinus.

"INTERNACIA MONDREGNO KREIGANTA", prezentas nur la politikan kaj socian flankon de tiu ĉi verko.

Por MARTINUS, la du ĉefaj kaŭzoj de la homaj suferoj estas unue la premanta potenco de la mono en la terhomaj socioj, kaj due la manko de mondaŭtoritato.

Por anstataŭigi la monon, la aŭtoro proponas la uzadon de laborkvitancoj. Tio signifas ke la laborservoj fariĝas la ununuran pagrimedon.

Ĉiu estulo (escepte la infanoj, maljunuloj kaj malsanuloj) devas sin mem vivteni kaj nur per sia farita laboro. Laŭ MARTINUS, kiam la mono aboliĝos, tiam kun ĝi malaperos egoismo, posedeme, avideco, envio.

Por anstataŭigi la naciajn sistemojn, li proponas la kunfandiĝon de ĉiuj landoj en unu regno, kaj t i o malebligos potencavidon kaj agresemon.

Tamen, li rimarkigas ke la evoluo de la homa socio nature iras pli kaj pli en direkton al internaciismo kaj altruismo, sed estas necese, ke tiu-

ĉi socia transformo estiĝu laŭgrade kreskanta evoluo.

Por iuj legantoj tiaj ideoj aspektos nur kiel revaĵo aŭ fantaziaĵo por aliaj ili aspektos kiel la sola solvo por pli feliĉa vivo.

L E G R E E
=====

XX

INTERNACIA PUPETFAKO
=====

Dum la internacia kongreso okazinta en Budapeŝto, fondiĝis la pupetgeaktora asocio, kies estraro estas: Prezidanto: Dro SZILAGYI Dezső, direktoro de la ŝtata pupteatro en Hungarujo; vicprezidantoj: S-ino BAND Anna, reĝisorino de la ŝtata pupteatro en Hungarujo, kaj S-ro Rudolf HAHLBOM, el la ŝtata pupteatro en Orienta Berlino; sekretariino: REGÖCI Elizabeta, aktorino kaj laboristino de oficejo de HEA; vic-sekretario: S-ro BANKY Robert, aktoro de la ŝtata pupteatro en Hungarujo; kasisto: S-ro CSEPELI Péter aktoro-ŝtata pupteatro en Hungarujo; propagandistino: F-ino Julia SIGMOND, aktorino ĉe la ŝtata pupteatro en Rumanio.

La prezidanto informis ke la Universala Asocio de Pupteatroj (UNIMA) pritraktos Esperanton, kiel oficialan lingvon de mondasocio dum la venonta ĝenerala kunveno de UNIMA, okazonta en orient-Berlino.

=====

ESPERANTO-ACTUALITES? ESPERANTO-ACTUALITES? ESPERANTO-ACTUALITES? ESPERANTO-ACTUALITES? ESPERANTO-ACTUALITES?

oo

Kiam vi pensas pri donaco, pensu pri libroj....
Aĉetu la libron de Jean ROSTAND: TIO KION MI KREDAS (prezo: 3 frankoj).

S-ro Manceau bonvolu proponi programon al la konsilio kaj trovi la taŭgan gvidanton.

La peticio de UEA ricevis la jenajn rezultojn: 77 parlamentanoj subskribis, same kiel 18000 unuopuloj, kaj 73 organizacioj, nome de 557.000 personoj.

La protokolo pri la Budapeŝta kongreso aperos en la revuo Esperanto.

INFORMADO: S-ro BOURDEAUX intencas aperigi franclingvan informjurnalono; ni atendas la sukceson de ESPERANTO-AKTUALITES.

La Bulletin d'Informations Mondiales estas prezentota laŭ nova formulo. Estas antaŭvidite aperigi F.E. 5000-ekzemplere dank'al reklamoj, sed kiu varbos reklamontojn?

DIVERSAJĴOJ: S-ro Ribot informas pri la novaĵaj aperdatoj de nia revuo (vidu la antaŭan numeron de R.F.E. paĝo 2-a "Améliorons notre bulletin national". La artikoloj devos atingi la redaktoron nepre antaŭ la 20-a de la antaŭa monato.

S-ro Ribot respondos al S-ro Contart pri eventuala organizado de turisma servo, pere de la tiufakaj delegitoj de U. E. A.

Sino VINCENT proponas malfermon de nia pariza sidejo dum aŭgusto, kun la helpo de liberaj samideanoj.

S-ro Rousseau, pri la telefono, sugestas plusendigi la telefonalkvokojn pere de la servo "abonnés absents".

S-ro Bourdeaux anoncas ke en franca urbo, firmao intencas uzi esperanton por sia reklamkampanjo kaj por junularagentejoj.

Por la Tel-Aviva kongreso en 1967, ebleco haltigi la ŝipon en Ateno. UFE vendas reklamajn haltdiskojn por aŭtomobiloj; ili estas aĉetebraj kontraŭ 1,50 F.

La kunveno finiĝis je la 15h30.
Protokolis Sinjorino VINCENT.

La Prezidanto:
R. LLECH-WALTER

ABONNEMENTS AUX REVUES =====

Nos membres trouveront ci-dessous une liste (non restrictive) des différentes revues auxquelles nous pouvons transmettre leurs abonnements:

BULGARIO	Fr	15,00
C.E.D. Dokumentoj	Fr	7,70
EL POPOLA ĈINIO: 1 an ...	Fr	3,00
2 ans ..	Fr	4,50
3 ans ..	Fr	6,00
ESPERANTO INTERNACIA	Fr	27,00
HEROLDO DE ESPERANTO	Fr	18,50
HOMO kaj KOSMO	Fr	7,00
HUNGARA VIVO	Fr	8,00
KONTAKTO	Fr	11,20
KULTURAJ KAJEROJ	Fr	7,00
La PRAKTIKO	Fr	14,00
NORDA PRISMO	Fr	14,00
NOVA CIVITO	Fr	10,25
OOMOTO	Fr	6,50

KOTIZOJ AL U.E.A. =====

Laŭ decido de la Komitato dum la 51-a U.K. la kotizoj por 1967 estas la jenaj:

Membro-abonanto	Fr	35,00
Membro-abon. Kontakto	Fr	35,00
Membro-Junulo	Fr	17,50
Membro-subtenanto	Fr	55,00
Dumviva membro	Fr	700,00
Abono al ESPERANTO	Fr	27,00

BESTKALENDARO 1967 =====

Estas ja tempo jam mendi tiun belan kalendaron grandformatan (30x42) kun koloraj pentraĵoj pri birdoj kaj aliaj bestoj sur tre bona papero kun detala priskribo dorsflanke.

La prezo estas 5,50 F. por unu ekzemplero; sed 10 ekz. kostos nur 50 F. kondiĉe ke ili estu mendataj samtempe, kaj sendotaj al la sama adreso.

NIAJ LEGANTOJ SKRIBIS...

S-ro PERSONNE (La Varenne): "Antaŭ ol presigi la ofsetan bultenon per pli malgrandaj literoj, pensu pri la gemaljunuloj kaj eĉ pri la malpli gemaljunuloj, kiuj ankaŭ ne havas bonajn okulojn..."

Resp.: Jes, ni jam pensis pri tiu grava detalo de facila legebleco. La ĉefa punkto estas prezenti revuon agrablan por legi. Verŝajne ekzistas kontentiga solvo, kiun S-ro Rousseau scios trovi.

=====

NEKROLOGO

S-ro BOURGOIS en Noyelles-Godault, informis nin pri la forpaso de sia patrino, honora lernejestrino. Sinceran kondolencon al li kaj al lia familio.

SOEUR MARIE-NATHALIE forpasis la 25-an de septembro 1966, en Montpel-lier.

Ni memoru ke dum multaj jaroj el sia vivo, ŝi multe klopodis pris Esperanto en la katolikaj medioj, per kursoj kaj valora broŝuro bedaŭrinde nun elĉerpita.

=====

NI HELPU NIAJN MADAGASKARAJN AMIKOJN

Jen la adreso al kiu vi direktos viajn leterojn (individuaajn, amase subskribitajn, ktp...):

Radio-Diffusion Malgache (chaîne internationale) B.P. 442 TANANARIVE, (Republika Malagasy).

Skribu en esperanto, kun la kopio en franca lingvo, kaj laŭeble registre por doni al ili oficialan pre-

La elsendoj en angla kaj franca lingvoj nun estas aŭdeblaj ĉiutage de la 16a ĝis la 17a horo (GMT), je 19, 664 metroj kaj 15270 kc.

VIVA DE LA GRUPOJ

LES ANDELYS - La grupo havas 41 mem-
===== brojn. Unu junulino, partoprenis la Kulturan Semajnon en Grésillon; ŝia frato restadis en Anglujo, ĉe diversaj esperantistoj, en junio. Du membroj partoprenis la 51-an UK en Budapeŝto kaj 4 lernantinoj pasigis 10 tagojn en Grésillon en septembro.

Tri kursoj funkcias merkrede (1-an jaron), sabate (2an jaron), vendrede (3an jaron), ĉe la knabina lernejo 8 Bd Néhou de la 17a ĝis la 18a horo.

BOURG-la-REINE - La grupo organizis
===== amikan komunan vespermanĝon la 27-an de oktobro, okaze de la 90-a naskiĝdatreveno de sia prezidanto, D-ro Gaston MAILLARD.

CHATENAY-MALABRY - La tiea grupo a-
===== rangis ekspozicion la 1/2 de oktobro en la Foyer Culturel Léo-Lagrange, kiun la urbestro inaŭguris.

SOLLIES-PONT - S-ro MATHIS informas,
===== ke du kursoj okazas, por komencantoj kaj progresantaj gelernantoj, kaj same en LA FARLEDE. Plie, tie ĉi okazas ankaŭ kurso por plenkreskuloj (el kiuj 5 gepatroj de la lernantoj de la pasinta jaro).

LES ANDELYS (aldono) Semajnfino oka-
===== ze de la Zamenhof - tago la 10-an de decembro je 20h30: "De l' bordoj de Sejno ĝis tiuj de Danubo", per diapozitivaj; 11-an de decembro: 12h30: komuna tagmanĝo; forumo pri la malsato en la mondo. Prezo: 15 F. (ĉambroj ĉirkaŭ 15 F). Aliĝoj ĝis la 1-a de decembro al S-ino J. VINCENT, CCP ROUEN 574.88 M.

xxxooxxxxoxxxxoxxxxoxxxxoxxxxoxxxxoox

KONTOJ DE LA BUGEET-PERIODO 1964-1965

ELTIRAJO EL LA RAPORTO DE LA KONTREVIZINTO

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Estimataj Gesamideanoj!

Laŭ la artikolo 11 de la regularo de UFE, la tasko de la kontrevizoroj konsistas nur el la kontrolo pri la reguleco de la kontoj. Tio estus sufiĉa, kondiĉe ke la financaj dokumentoj submetitaj al la kontrolo reprezentu la ekzaktan kaj klaran bildon de la financa situacio de la Asocio je la koncerna dato. Se ne estus tiel, la aserto pri la ĝusteco de la kontoj estus vana kaj sensignifa. Efektive, estas tute senutile scii ke ciferoj estas ĝustaj kaj regulaj, se ili estas kunmetitaj en tia ordo, ke ili reprezentas nenion.

Nu, kiel mi montros al vi post momento, la financaj dokumentoj, kiuj estis ĝis nun prezentitaj al vi de la konsilio ne estas adekvataj por esprimi la pluraspektan aktivecon de UFE. Tial, prefere ol verki la kutiman ĉiu-jaran raporton pri la reguleco de la kontoj, mi opinias ke estus pli utila laboro elpensi novan librotenan sistemon kaj refari la librotenadon de la jarperiodo laŭ tiu sistemo por prezenti al la aprobo de la kongreso financajn dokumentojn adekvatajn laŭ la formo kaj la enhavo.

Tiu ĉi laboro estas la objekto de la jena raporto, kies precipa parto konsistos el la prezento kaj komento de la financaj tabeloj, kiujn mi ellaboris, kaj kiujn vi nun havas en la manoj.

Sed unue, mi ekspliku, kial mi ŝanĝis la librotenan sistemon de la Asocio.

I-Kritiko de la librotena sistemo de UFE

Kontoj ĉe asocio havas duoblan funkcion. La unua havas fonton en la statuto kaj regularo, kiuj devigas la administrantojn informi ĉiujare la membrojn pri la uzo de la mono, kiun tiuj provizis al la asocio pagante siajn kotizojn. El tiu

ĉi vidpunkto, la sola postulo, kiun oni povas fari pri la kontoj estas ilia reguleco, nome ke la kotizoj estu uzataj konforme al la celo de la asocio, kaj ne servu al ekstravaganca agado aŭ, evidente, al persona uzo de la administrantoj.

La dua funkcio estas mastruma. En tiu ĉi funkcio estas utilaj kontoj, nur se ili povas esti uzataj de la administrantoj kiel mastrumiloj aŭ kiel barometro de la agado.

a) el la vidpunkto de la reguleco: Koncerne nian asocion, la librotenado estis sufiĉe adekvata por la kontrolo de la unua funkcio de la kontoj. Transpreninte de la kasisto la financajn tabelojn, la kontrevizoroj plenumis la kontrolo de ĝiaj rubrikoj laŭ tri direktoj: 1) kontrolo, ke la kaskontoj korespondas al la mono en la kaso, kaj al la saldo komunikita de la banko kaj de la poŝtĉekkonta administracio; 2) ke la spezoj sumigitaj sub unu difinita rubriko de la tabelo korespondas ekzakte al la titolo de la rubriko; 3) ke la spezo estas efektiva t. e. pravigita per kontĝustigilo (fakturo, kvitanco, ktp). Koncerne la 2-an kaj 3-an punktojn, la kontrevizantoj evidente ne povas kontroli unuope ĉiujn spezojn, sed devas limigi sin al sondado de kelkaj punktoj. El la rezulto de la sondado, ili akiras aŭ ne la konvinkon, ke, por la cetero oni povas konfidi je la lojaleco de la kasisto. Sen minimuma konfido al la gvidantoj - mi intence rimarkigas - neniu asocio, same kiel neniu organizaĵo povas korekte funkcii.

Ekzameninte la kontojn de UFE laŭ la principoj ĉi - supre antaŭmetitaj, mi asertas, ke la kasisto metis neniun obstaklon al la plenumo de mia mandato, ke li montris ĉiujn dokumentojn, kontĝustigilojn kaj fakturojn, kiujn mi deziris, ke li liveris al mi ĉiujn eksplikojn bezonatajn, ke entute la librotenado korespondas al la realeco de la faktoj. Mi persone havas plenan konfidon je la lojaleco kaj kapableco de la kasisto kaj opinias, ke la membroj povas dividi kun mi tiun konfidon, ĉar ĝi baziĝas ne nur

sur persona sento, sed sur faktoj kontrolitaj. Tial mi energie protestas kontraŭ la asertoj publikaj - sed bedaŭrinde farataj per vojo ekstera al la institucioj kiujn libere donis al si nia asocio - de unu membro, laŭ kiu la plej grava malordo regus en la kontado. La suspekto, kiun li klopodas dividi kun la membroj pere de multobligita bulteno, havas fonton - mi tion proklamas - ne en la faktoj, sed pli ĝuste en lia malkonfido al la kasisto kaj en lia persista rankoro kontraŭ li

b) el la vidpunkto de la mastruma laboro:

El tiu vidpunkto, mi kontraŭe povas nur deklari ke la kotsistemo de UFE havas neniun valoron. Vere ni povas eltiri nenian informon pri la stato de la asocio, simple legante la financajn raportojn de la estraro. La speztabelo estas nur senorda ciferaro, kiu intermiksas la kontojn, kiuj esprimas la konsiston de la kapitalo, kun tiuj, kiuj esprimas la fonton de ties variado. Ĝi ankaŭ ne informas pri la stato de la ŝuldoj nek pri la valoro de la librostoko.

Se la administrantoj kontentiĝis dum multaj jaroj pri tiu ĉi stranga situacio tio pruvas kun evidento, ke ili ne havis la konvinkon, ke por bone gvidi asocion, estas necese mastrumi ankaŭ la financojn. Ili kondukis kiel privatulo, al kiu sufiĉas scii, kiom da mono fluas regule en la kaso, por sufiĉe saĝe direkti la familian buĝeton. Ili ne konsciiĝis, ke la pluraspekta aktiveco de UFE, konsistanta el tiel diversaj faktoj, kiel informa kaj propaganda servo, libroservo, eldonfako, turisma servo, postulas tre adekvatan organizon kaj solidan financon fundamenton. Se la asocio ne bankrotis, tio ne estas ŝuldata al saĝa mastrumado, sed al tiu instinkto, kiu ordonas, ke oni lasu ĉiam iom da akvo en la kruĉo por esti certa havi trinkaĵon la morgaŭan tagon. Kiam iun jaron la akvo-nivelo fariĝis vere malalta en la kruĉo pro repago de akumulitaj ŝuldoj, ili eble bedaŭris la mankon de financa informado, sed ili ekpensis pri eventualaj rimedoj nur sub la premo de la cirkonstancoj, ĉar ilin urĝis la akraj kritikoj entenataj en la jam aludita bulteno. Tial la Prezidanto fine

faris decidon: alvoki fakulon por organizi la librotenadon. Sed influite de kia kalkulo, li ĝuste elektis por kunlabori kun la kasisto la redaktoron de la jam menciita bulteno. Kiaj fruktoj estis espereblaj de la kunlaborado de unu homo kiu esprimis publike sian malkonfidon kaj malestimon kontraŭ la alia? Konflikto de personoj, interŝanĝo de akraj vortoj, miriga manko de takto flanke de la alvokinto kiel de la alvokito, fiaskigis la aferon. Nur io pozitive restis: la projekto de kontlisto, kiun la alvokito publikigis en sia bulteno, kaj kiun mi konsideras kiel valoran kontribuadon al la celo, kiu poste estis la mia.

Mi efektive konvinkiĝis, ke la malfeliĉaj cirkonstancoj, pri kiuj mi ĵus aludis, ne devis malfruigi la necesan reformadon de la librotenado, kaj post funda studado, mi proponis planon por havigi al UFE racian kotsistemon, taŭgan por bona financa mastrumado.

Ricevinte la aprobon, mi unue ŝanĝis la malnovan sistemon, kaj anstataŭis ĝin per moderna trakopia materialo. Post la ellaboro de la kontlisto, mi refaris la librotenadon de la koncerna periodo pere de la nova materialo, kaj mi redaktis la financajn dokumentojn, kiujn vi havas en la manoj, sub formo konforma al la konttekniko, kaj samtempe, mi esperas, sub formo klara eĉ por laikoj. Ekde nun, konforme al nia interkonsento, la kasisto transprenos la uzadon de la nova materialo kaj respondecos pri la financaj dokumentoj sub la formo, kiun mi difinis, se nur vi aprobas ĝin.

II- Prezento, analizo kaj komento de la financaj dokumentoj:

Nun, mi prezentos al vi la financajn dokumentojn, kiujn vi havas en la manoj, kaj mi provos komenti ilin laŭ la vidpunkto, kiel mi rigardas sanan mastrumadon.

a) la bilanco: Je la fino de la pasinta jaro la librostoko reprezentis preskaŭ la tuton de la asocia kapitalo. Je la fino de la nuna, ĝi reprezentas pli akcepteblan proporcion: la duonon de la

kapitale. Ĉar mi konsideras tiun proporcion akoraŭ tro forta, mi detale analizis la inventarojn de la du jaroj, inventarojn, kiuj estis tre kompetente kaj zorge preparitaj de s-ano POLY. Laŭ mia kalkulo la sekvantaj kolektoj likvidiĝos jene: Esperanto-manuel en 1 jaro; Héros existentialistes en 1 jaro (sed laŭ vendokajero, la vendado nun estas preskaŭ nula); Lexique Léger en 2 jaroj; militista en 90 jaroj (tiom! sed ĉiu ekzemplero kostas nur 0,90 F.) kaj "Tio, kion mi kredas" en 14 jaroj. La 4843 poŝtkartoj likvidiĝos post pli ol 10 jaroj, se entute ili likvidiĝos. Kun tiuj kolektoj la stoko - en valoro - renoviĝas 1,2 fojojn en unu jaro; sen ili ĝi renoviĝas 2,5 fojojn en unu jaro, kio ne estas sufiĉa.

De tio, oni povas konkludi, ke librokolektoj estis aĉetitaj sen la plej eta konsidero al ilia vendebleco, kaj oni tre avare - eĉ apenaŭ rimarkeble - reklamis en la gazeto pri la koncernaj kolektoj. Do mi timas, ke la asocio neniam retrovu la kapitalon investitan en librojn.

La dua rimarkinda rubriko de la bilanco koncernas la oficejan materialon kaj meblaron. Kiel vi konstatis, nur la akiraĵoj de la jaro aperas. Prave, ĉar ĉiuj maŝinoj estas jam de longe amortiĝintaj. Eĉ pli, ili estos baldaŭ tute eluzitaj kaj kadukiĝintaj. Estas do necese antaŭvidi por la estontaj jaroj investan planon por eviti, ke iun jaron oni devu anstataŭi plurajn maŝinojn sam-

La tria rimarko koncernas la manipulado de la enspezoj. Ĉiujare, fine de la sezono de la kotiz-kolekto, la poŝtĉekkonto ŝveliĝas, kaj progresive malkreskas laŭmezure kiel oni retratas por la bezonoj de la Asocio. Saĝa decido estus ĝiri - eĉ se nur por kelkaj monatoj - parton de tiu mono al la ŝparkaskonto, kiu produktas 2,80%-an interezon.

La bilanco montras ke la kapitalo de la asocio kreskis en 1964-65 en valoro, de 9000 F. Ni vidu kiel, ekzamenante la

mastrumkonton.

b) la mastrumkontoj: La unua parto de la tabelo resumas la finanĉan rezulton por la koncerna jaro. La ĝenerala mastrumado, t.e. la propaganda aktivado, saldiĝas per deficito de 7.700 F. (rondcifere). La servoj (libro-servo, abonkaj kotiz-kolektoj, karavana servo) alportis profiton de 11700 F. Do entute la rezultato de UFE saldiĝas per profito de 4.100 F. Per si mem tiu ĉi cifero estas sufiĉe elokventa por pruvi, ke la nacia sidejo de la Asocio ne estis endanĝerigita. Kompreneble, oni povas diskuti, ĉu estas normala afero, ke asocio vivtenu per pli-malpli komerca agado. Mia temo ne estas pravigi ĉi tiun situacion, sed nur konstati, ke sen ĝi U.F.E. vivus tre mizeran vivon, tiel senespere mizeran, ke ĝi estus kondamnita je morto certa post malpli ol unu jaro.

Do la plu ekzistado de la sidejo estas certigita ĝuste dank' al la enspezo de tiuj ĉi akcesoraj profitoj. Estas klare, ke la gvidantoj tute ne konsciiĝis pri tiu ĉi enspezfonto, ĉar la prezidanto faris alvokon al la membroj por ke ili kontribuu finance al la konservado de la sidejo, sur kiu pezas, kiel ni vidos, pli da kostoj ol la kotizoj povas elporti. Decas do informi la donacintojn ke iliaj kontribuajoj ne servos por ŝtopi breĉon en la buĝeto de UFE, sed estos konsiderataj kiel sumoj investotaj en specialan fondaĵon. Mi pensas ke tiu ĉi informo estas el speco, kiu nur povas esti ĝoje akceptata.

La dua parto de la tabelo reliefigas la fonton de la deficito de la ĝenerala mastrumado (por memoro 7700 F.) Ĝi ilustras, ke la kotizoj ne sufiĉas por pagi eĉ la fiksajn elspezojn, t.e. tiujn kiuj neniel povas esti reduktitaj (ekz. luprezzo). Tie ĉi la deficito saldiĝas per deficito de 3.300 F. Kun la nefiksaj enkaj el-spezoj, la deficito altiĝas ĝis 7612,47 F.

KONKLUDO: La ekzamenado de la kontoj de la jarperiodo estas nun finita. Mi klopodis malkaŝi al vi tra la kontoj kiel

eble plej ekzaktan bildon de nia asocio
 Mi esperas, ke mi parte sukcesis; se kelkaj punktoj restis tamen malklaraj, la tuj okazonta debato ebligos heligi ilin.

Por konkludi, mi volas diri, ke mi havas fidon je la estonteco de UFE, je ĝia kapablo direkti saĝe kaj efike sian agadon por la progresado de Esperanto se nur ĝi havas la volon. Nu, mi kredas je tiu ĉi volo, je la volo de ĉiuj membroj senlace labori en ordo kaj disciplino. Mi kredas ankaŭ je la volo de la Konsilio reformi sin mem kaj siajn metodojn por realigi pli efikan kaj ne kontesteban direktadon. Vi konstatis la reformadon de la kontsistemo; aliaj reformoj sekvas certe laŭ mia scio. Ni esperu, ke tiuj, kiuj en la sino mem de la Konsilio ilin rekomendas, scios aŭdigi sian voĉon, kaj dividi kun la aliaj sian klarvidecon.

Por nun la parolo estas al la Kongreso, por la aprobo de la kontoj, kaj la kvitigo de la kasisto, la aprobo de la nova kontsistemo kaj de la formo de la financaj dokumentoj, kaj por la decido, pri la destino de la profito de la jarperiodo, kiu, mi rememorigas al vi, sumiĝas je 9.411,55 F (inkluzive la enspezon "maintien du siège" por 5241,85F).

Vi havas la parolon...

La kontrevizinto:
 Pierre ROYER

(Tiu ĉi teksto estas mallongigo konforma al la originala dokumento voĉlegita en Agen, kaj liverita du-ekzemplere: originalo por la arkivo de UFE, kopio al la protokolinto de la Kongreso, je la dispono de la membroj, por eventuala konsultado).

La kongresprotokolinto
 François GARRIGUE

A L D O N A J T A B E L O J
 (resumitaj)

<u>I - BILANCO</u> (konsisto de la asocia kapitalo)	30.9.65	variado 1964/65	30.9.64
<u>AKTIVO</u>			
Oficeja meblaro	274,50	+ 274,50	0,00
Alprunto Maison Culturelle	2.500,00	0,00	2.500,00
Librostoko	12.178,87	+ 596,85	11.582,02
Debitoroj	6.644,97	+ 4.401,02	2.243,95
Subvencio ricevota	"	- 1.800,00	1.800,00
Valorperoj	1.139,08	+ 1.139,08	0,00
Sparkaskonto	1.829,91	+ 53,29	1.776,62
Kaskontoj	3.060,09	- 85,22	3.145,31
sumo de la aktivo.....	27.627,42	+ 4.579,52	23.047,90
<u>PASIVO</u>			
Amortiza fondaĵo	27,45	+ 27,45	0,00
Kreditoroj	4.855,38	- 1.967,68	6.823,06
Elspezoj pagotaj	0,00	- 2.891,80	2.891,80
sumo de la pasivo.....	4.882,83	- 4.832,03	9.714,86
ASOCIA KAPITALO (diférenco).....	22.744,59	+ 9.411,55	13.333,04

II - MASTRUMKONTO (Fonto de la Asocia Kapitalo)

	Malprofito	Profito
A - Mastrumkonto kuranta jaro		
mastrumo ĝenerala	7.612,47	
revue française d'espéranto		630,84
libroservo		1.649,36
biblioteko		280,05
ristornoj el abonkolektado		2.837,40
ristornoj el kotizkolekto		2.456,86
karavana servo, kulturaj ensp.		3.927,66
	<hr/>	<hr/>
sumo.....	7.612,47	11.782,17
		<hr/>
malneta profito (diferenco).....		4.169,70
fondaĵo oficejo		5.241,85
		<hr/>
neta profito.....		9.411,55
B - Fondaĵo-kontoj fine de la pasinta jaro:		
fondaĵo ĝenerala	12.793,23	
fondaĵo oficejo	401,00	
fondaĵo biblioteko	138,81	
statuta fondaĵo	0,00	
	<hr/>	<hr/>
sumo.....		13.333,04
		<hr/>
C - ASOCIA KAPITALO fine de la kuranta jaro.....		22.744,59

III - ANALIZO DE LA KONTO "MASTRUMO ĜENERALA (tabelo II linio 1)

	Debeto (elspezoj)	Kredito (enspezoj)
kotizoj		9.317,60
procento JEFO (minus)		101,00
fiksaj elspezoj (salajro, luprezo, ktp...)	12.601,78	
	<hr/>	<hr/>
sumo.....	12.601,78	9.216,60
		<hr/>
malneta malprofito	3.385,18	
koresponda kurso	300,00	474,20
cirkuleroj, propagandiloj	1.815,01	776,96
interezoj (ŝparkaso, alprunto)		153,29
propagando (a) subtena kampanjo (b)	1.357,74	b) 1.766,86
oficejaj elspezoj	465,41	
poŝtaj elspezoj	1.715,84	
trinkmono, etaj elspezoj	113,40	
bankelspezoj	19,56	
biblioteko	400,00	
trimonata bulteno	1.611,64	
subvencioj	100,00	500,00
	<hr/>	<hr/>
sumo.....	11.283,78	3.671,31
		<hr/>
neta malprofito..	7.612,47	

Sous le titre "LENINE A CHOISI LA LIBERTE", l'AURORE du 30 septembre raconte, sous la plume d'André VIGO, comment l'acteur soviétique Nicolas RYTKOV, qui incarnait depuis plus de trente ans Lénine dans la plupart des films et des pièces de théâtre consacrés au père de la Russie moderne, a choisi de quitter son pays pour se réfugier en Grande-Bretagne.

Précisons que Nicolas Rytkov était un espérantiste très connu. Aux journalistes venus l'interviewer, il a raconté comment Staline avait mis (comme Hitler en 1936) l'espéranto hors la loi, et fait arrêter les espérantistes.

Il a précisé qu'il avait été convoqué récemment par la police, laquelle lui avait expliqué qu'il pourrait rendre de grands services à l'Etat en acceptant de s'infiltrer à nouveau dans les milieux espérantistes qui s'étaient reconstitués en U.R.S.S.... Il devait à nouveau incarner Lénine en 1970 pour les cérémonies du centenaire de sa naissance.

Et l'auteur de l'article de conclure: "C'est peut-être la raison profonde de sa fuite: il s'est révolté contre son modèle..."

La NOUVELLE REPUBLIQUE à Tours du 3/10: "L'Espéranto et le monde d'aujourd'hui", une exposition organisée à la Bibliothèque de la Ville par le Centre Culturel Espéranto, animé par notre ami dévoué, M. MOTILLON, que nous sommes heureux de féliciter à cette occasion.

Le "COMTOIS" du 28/9 et la "PRESSE DE GRAY": "Les Espérantistes à la Conférence Internationale de Bâle", par notre ami JUNIER.

"L'INDEPENDANT DU PAS-de-CALAIS", à Saint-Omer le 1/10, cote l'excellente intervention faite par notre ami Me BIGOURD, avocat, ancien bâ-

tonnier, au Congrès Fédéral des Anciens Combattants sur le thème L'ESPERANTO, LANGUE EUROPEENNE.

NORD-LITTORAL, du 4/10 a consacré un long article avec photo à la préparation de notre prochain Congrès National à CALAIS. Il y est précisé que le Comité d'Organisation, composé de M. BUERICK, BIGOURG, BONVOISIN DITACROUTE, etc...fera appel aux diverses associations culturelles de la ville. La MAISON DU TOURISME, et les "AMIS DU VIEUX-CALAIS" prêteront également leur concours.

Les hebdomadaires de la T.V. et la presse avaient annoncé la présentation sur la 2ème chaîne, le 20/9, d'une séquence du film INKUBO. Renseignements pris, la présentation n'a pas eu lieu, mais la projection officielle est repoussée à fin novembre, dans les cinémas d'art et d'essai de Paris.

Le "COURRIER du VALENCIENNOIS" du 1 octobre: interview, avec photos, du sympathique et dynamique M. LIGOT, président du groupe espérantiste de Valenciennes.

LIBERTE-DIMANCHE (Rouen) du 9/10: "A Sotteville, les jumelages: le problème linguistique et sa solution évoquée à la réunion du groupe espérantiste".

-o-o-o-o-o-

Suite au Dictionnaire des Insultes

Dans la chronique parisienne du "DAUPHINE LIBERE" (15/9), intitulée "Le désespéranto" (!) P. Vincent constate que les insultes jouent un rôle grandissant dans "la langue internationale des automobilistes": le désespéranto", en quelque sorte!!

-o-o-o-o-o-

J unulara
-
E sperantista
-
F ranca
-
O rganizo
-

Dum la lasta kunsido de U. F. E. en Agen, la estraro de JEFO decidis organizi tutlandan renkontigon dum sekvonta Pasko.

Poste okazos germana-franca seminario en orienta franca urbo. Ni baldaŭ donos pliajn informojn kaj esperas, ke vi venos amase.

Nia lando estas unu el la landoj, kiuj je la 31-a de decembro 1965 havis plej nombrajn abonantojn al la revuo "KONTAKTO", tutmonda revuo por la junaj esperantistoj. Ni esperu ke ni ĉiam restos en la unuaj vicaj.

-o-o-o-o-o-

RAPORTO DE LA JUNUL-SEKCIO EN ROMANS
=====

La 26an de septembro, la junulara esperantista grupo en Romans ("Bona Stelo") kuniĝis en la budo de la foiro por ekzameni la aktivecon disvolvitan dum la pasintaj monatoj.

Oni diskutis pri plano por la venonta jaro: interŝanĝo de filmoj, diapozitivoj kaj sonbendoj kun aliaj landoj, kuniĝo antaŭ la departementa kongreso en Crest, vojaĝoj dum la ferioj en 1967.

Je la fino okazis la baloto por la nova estraro, kiu rezultis tiel:

Prezidanto: Jo CATIL

Vic-prezidanto: L. VERNEIN

Sekretariino: Yv. ROUSSET

Helpsekretariino: Rachèle BERNARDIS

La departementa federacio organizis budon dum la regiona foiro en Romans, de la 24-a de septembro ĝis la 2-a de oktobro 1966.

Ni daŭre informadis, kaj ni havis kontaktojn kun ne-esperantistoj el Drôme kaj Ardèche.

Ni kore dankas Fraŭlinon Yoshie OIJIMA, japana amikino, kiu loĝas en

Montpellier, pro ŝia helpo dum la 25-a de septembro pri propagando pri Esperanto.

Konklude, la sekcio daŭrigas efektivan laboron por la progreso de Esperanto. (laŭ raporto de S-ro Jo. CATIL).

:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

Ni eksciis de nia vicprezidantino pri la edziniĝo de ŝia fratino Raymond TRIOLLE kun René SCHMIDT.

Ni kore gratulas niajn geamikojn, kaj deziras al ili longan kaj feliĉan vivon.

oo

OFFRE EXCEPTIONNELLE VALABLE
JUSQU'AU 1-er DECEMBRE 1966:
=====

Un prix de faveur (5 Fr.) sera consenti à tous ceux de nos amis qui commanderont, avant le premier décembre prochain, la plaquette consacrée à AIME COTTON, prix Nobel de Physique, membre de l'Académie des Sciences, ardent et dévoué espérantiste, dans la collection "Les Grands Savants de Notre Temps" à paraître chez Pierre Seghers.

Nous devons cette faveur exceptionnelle à son épouse, Madame COTTON directrice honoraire de l'École Normale Supérieure de Sèvres, à qui nous tenons particulièrement à exprimer notre profonde gratitude.

Ce livre, qui retracera l'oeuvre scientifique d' Aimé COTTON, évoquera longuement sa "carrière d'espérantiste".

Nous conseillons vivement l'achat de ce livre à tous les responsables locaux et régionaux de l'information, ainsi qu' à tous nos amis de l'Enseignement.

Adrèsser les commandes à U. F. E. CCP PARIS 855-35. (A.B.)

